

KATOLIKA SENTO

Periodico dell'Unione Esperantista Cattolica Italiana

«Per la promozione della fratellanza e della comprensione tra i vari popoli di diverse lingue» - Paolo VI



Papo Benedikto: dialogo kiel stilo

Papa Benedetto: il dialogo come stile

aŭtoro: Pastro Emanuele Di Marco
esperantigis: Mirella De Martini

Ekde la jaro 2005 ĝis 2013 Papo Benedikto la 16-a recitis 398 fojojn la Anĝeluson kaj 60 fojojn la Ĉielreĝinon, li faris 24 internaciajn apostolajn vojaĝojn al 22 landoj, 30 apostolajn vojaĝojn al Italio, 36 paŝtistajn vizitojn al la diocezo de Romo. Ili estas sendube

Dal 2005 al 2013 Papa Benedetto XVI ha recitato 398 volte l'Angelus e 60 il Regina Coeli, ha compiuto 24 viaggi apostolici internazionali in 22 Paesi, 30 viaggi apostolici in Italia, 36 visite pastorali nella diocesi di Roma. Numeri che chiaramente non raggiungono quelli di

ciferoj, kiuj ne ĝisatingas tiujn de Johano Paŭlo la 2-a, sed kiuj estas kaj restas signifaj: la germana papo havis multajn ŝancojn por anonci la Evangelion, sed ankaŭ por dialogi.

Ratzinger – kiel Prefekto de la Kongregacio por la doktrino de la kredo – jam havis la eblecon elmontri sian zorgon pri dialogo kun la aliaj kristanaj konfesioj kaj kun la aliaj religioj. Li prizorgis la renkontiĝojn en Asizo en 1986, 1993 kaj 2002.

En 2011 Papo Benedikto la 16-a, okaze de la 25-a datreveno de la unua interreligia renkontiĝo en Asizo, rekomencis preĝadon kun la aliaj religiestroj.

Trovi unu la alian, interkonatiĝi, interparoli: la celo de Papo Benedikto manifestiĝis ankaŭ per la maniero vojaĝi al Asizo: el Vatikano speciala trajno, transportanta la diversajn gvidantojn de la mondireligioj, atingis la umbrian urbon.

Por Benedikto la 16-a gravis sincera dialogo, kaj li bone sciis, ke fakte ĝi eblas pere de simplaj iloj kaj situacioj, akompanantaj la oficialajn momentojn.

Papo Benedikto estis tute aŭtentike “pilgrimo en dialogo”: konsciante pri la profundaj ŝanĝoj sociaj kaj de pensmaniero, li neniam avaris dialogi kun la nuntempa mondo kaj kun la realo de la aliaj religiaj konfesioj. Jam kiam li estis universitata profesoro, Joseph Ratzinger ĉiam proponis la dialogo-vojon kiel manieron por interkonatiĝi kaj interkompreniĝi. Ĉi tiun “stilon” li efektivigis kun sia samtempa mondo, kun la scienca mondo, kun la aliaj religioj. Ne temis pri strategio aŭ pri solvo laŭ oportuneo.

Sciigite pri lia morto, la estroj de la ĉefaj mondireligioj tiele sin esprimis.

Giovanni Paolo II, ma che sono e restano significativi: il Papa tedesco ha avuto molte occasioni per annunciare il Vangelo, ma anche per dialogare.

Ratzinger aveva – in qualità di Prefetto della Congregazione per la dottrina della fede – già avuto modo di mostrare la sua cura per il dialogo con le altre confessioni cristiane e con le altre religioni. Ha curato gli incontri di Assisi del 1986, 1993 e 2002.

Nel 2011 Papa Benedetto XVI ha ripreso, nel 25mo anniversario del primo incontro interreligioso ad Assisi, la preghiera con gli altri leader religiosi.

Trovarsi, conoscersi, dialogare: l'intento di Papa Benedetto si è espresso anche nelle modalità del viaggio ad Assisi: dal Vaticano un treno speciale ha raggiunto la città umbra con a bordo i vari responsabili delle religioni mondiali.

Per Benedetto XVI era importante un dialogo sincero e sapeva bene che questo era possibile proprio attraverso semplici strumenti e situazioni che accompagnassero i momenti ufficiali.

Papa Benedetto è stato un vero e proprio “pellegrino in dialogo”: consapevole dei profondi cambiamenti sociali e di mentalità, non ha mai lesinato nell'entrare in dialogo con il mondo contemporaneo e con la realtà delle altre confessioni religiose. Già da professore universitario, Joseph Ratzinger ha sempre proposto la via del dialogo come la strada per conoscersi e comprendersi. Questo “stile” lo ha percorso con la contemporaneità, con il mondo scientifico, con le altre religioni. Non si trattava di una strategia o di una soluzione di comodo.

Alla notizia della sua morte, così si sono espressi i leader delle maggiori religioni mondiali.



«Ni memoras lian teologian elstarecon, kiu dum la jaroj de lia papregado donis la okazon por intelekta debato inter kristanoj kaj islama mondo», diras la italaj muzulmanoj de Itala Islama Religia Komunumo (Coreis). «Ni krome memoras la preĝon de Benedikto la 16-a en la Instanbula Blua moskeo en 2006, kaj ni preĝas, ke lia dezirego pri vero fine povu renkonti sian Sinjoron en la granda paco», aldonas la reprezentantoj de Islamo.

«Benedikto la 16-a dum sia mallonga sed intensa regado postlasis spuron, kiu gravas ne nur en sia eklezio, sed ankaŭ en la tuta mondo. Sciigo pri lia morto lasas nin ĉagrenitaj kaj priplorantaj la perdon de interparolanto treege altnivela, firma en lia kredo kaj en liaj konvinkoj, sed preta respektoplene aŭskulti», rimarkis Riccardo Di Segni, Roma ĉefrabeno. Ratzinger estas «papo, kiu montris kuraĝon kaj koheron en siaj elektoj. Ankaŭ ĉe la lumo de tio, profundaj estas do kortuŝo kaj dankemo, adiaŭante gravulon, kiu faris historion kaj semis la fundamentojn por pli bona estonteco, ne nur por la eklezio», memoras Unio de Italaj Judaj Komunumoj, dum por la italaj budhanoj Benedikto la 16-a estis «homo de profunda penso kaj teologia esploro, zorgema pri interreligia dialogo. Lia elstareco kiel sagaca klerulo kuniĝis kun lia mildeco. Lia rezigno pri la pontifika trono estis gesto, kiu frapis la tutan mondon kaj la komunumon de kredantoj je iu ajn kredo».

La kontribuoj de Papo Benedikto al la dialogo estas multaj, sed nun, kiam li finis sian surteran irvojon, eĉ pli evidentiĝas ĉi tiu konvinko: dialogo estas stilo, kiu fariĝas en tio, kion la homaro estas travivanta, privilegia vojo laŭrenda. Kun ĉiu ajn.

Pastro Emanuele Di Marco

Direktoro de la Centro pri Pastoral Liturgio de la diocezo de Lugano, episkopa ceremoniestro, direktoro de la oratorio (t.e. ĉereligimedia porjunulara edukdistrejo) de Lugano, pastro ĉe Civita Protekto de Lugano. En 2014, ĉe la Pontifika Laterana Universitato, Vatikano, li akiris la titolon de doktoro pri Pastoral Teologio.

«Ricordiamo la sua levatura teologica che negli anni del suo pontificato ha dato l'occasione per un dibattito intellettuale tra cristiani e mondo islamico», dicono i musulmani italiani della Comunità Religiosa Islamica Italiana (Coreis). «Ricordiamo inoltre la preghiera di Benedetto XVI nella Moschea Blu di Istanbul nel 2006 e preghiamo che il suo anelito di Verità possa finalmente incontrare il suo Signore nella grande Pace», aggiungono i rappresentanti dell'Islam.

«Benedetto XVI nel suo pontificato breve ma intenso ha lasciato un segno importante non solo nella sua Chiesa ma nel mondo intero. La notizia della sua morte ci lascia con il rammarico e il rimpianto per la perdita di un interlocutore di altissimo livello, fermo nella sua fede e nelle sue convinzioni, ma disposto all'ascolto rispettoso», ha rimarcato Riccardo Di Segni, Rabbino Capo di Roma. Ratzinger è «un Papa che ha mostrato coraggio e coerenza nelle sue scelte. Anche alla luce di ciò, sono pertanto profonde la commozione e la riconoscenza nel salutare un personaggio che ha fatto la Storia e seminato le basi per un futuro migliore, non soltanto per la Chiesa», ricorda l'Unione delle Comunità Ebraiche Italiane, mentre per i Buddhisti italiani Benedetto XVI è stato «uomo di profondo pensiero e ricerca teologica, attento al dialogo interreligioso. La sua statura di fine studioso si accompagnava alla sua mansuetudine. La sua rinuncia al trono pontificio fu un gesto che colpì l'intero mondo e la comunità dei credenti in qualsiasi fede».

I contributi di Papa Benedetto al dialogo sono molti, ma ora che ha terminato il suo cammino terreno, emerge ancora di più questa convinzione: il dialogo è uno stile che, in quello che l'umanità sta vivendo, diventa una strada privilegiata che dobbiamo percorrere. Con chiunque.






Mi havas bone ĉeestanta en mia menso Esperanton

aŭtoro Carlo Sarandrea

MALDEKSTRE: CARLO SARANDREA
KAJ PASTRO FEDERICO LOMBARDI

La 3-an de marto 2006 Benedikto la 16-a vizitis la sidejon de Radio Vatikana. Okaze de la 75-jariĝo de Radio Vatikana (fondita en 1931 de Pio la 11-a), papo Benedikto la 16-a vizitis la 3-an de marto 2006, la domon "Palaco Pio", en kiu estas la redakcioj kaj produktada centro de la elsendoj. Dum la vizito la Papo gvidis liturgion de la Parolo, benis kaj dediĉis al Johano Paŭlo la 2-a restrukturigitan studion (la saman studion en kiu, antaŭ ol esti Papo, kard. Wojtyła sonbendis pollingvaj prireligiajn elsendojn). Benedikto la 16-a ankaŭ alparolis la aŭskultantojn pere de speciala rekta elsendo, dum kiu li estis ankaŭ intervjuita. La Papo ankaŭ trairis ĉiujn etaĝojn de la palaco, por viziti la diversajn redakciajn ĉambrojn. La redaktoroj estis grupigitaj laŭ lingvaj grupoj. La redaktoro de la elsendo en Esperanto atendis la Papon kun la kolegoj de la armena, latva kaj litova sekcioj. Akompanis la Papon pastro Federico Lombardi, ĝenerala direktoro de la Radio (hodiaŭ ankaŭ direktoro de la gazetara salono de la Sankta Seĝo). Unue, li prezentis al la Papo la diversajn redakciojn.

- Pastro Lombardi: «Ĉi tie estas armenoj, litovoj, latvoj kaj ankaŭ Esperanto».
- La Papo: «Ankaŭ Esperanto! Mi havas bone ĉeestanta en mia menso Esperanton».
- Pastro Lombardi: «Ni havas la asocion de la katolikaj esperantistoj kiuj pretigas la programon en Esperanto...».
- La Papo: «Ĉu estas personoj kiuj aŭskultas la programon? ».
- Pastro Lombardi: «Jes jes, ĉefe en centra kaj norda Eŭropo. Kaj nekatolikaj... ».
- La Papo: «Ĉu eĉ nekatolikaj? ».
- Pastro Lombardi: «Jes, jes ĝi estas ekumena servo... ».



El la Kruco Li enŝaltas la vivon - Dalla Croce Egli accende la vita

Mesaĝo de Papo Francisko

Messaggio di Papa Francesco

Neniu povas saviĝi
per si sola.

Nessuno può salvarsi da solo.



Rekomenci de KOVIM-19 por kune plani vojojn de paco
Ripartire dal COVID-19 per tracciare insieme sentieri di pace

KOVIM-19 faligis nin en la koron de la nokto, renversante nian ordinaran vivon, niajn planojn kaj niajn kutimojn. KOVIM-19 kaŭzis ĝeneralan misfarton, kiu koncentriĝis en la koro de multaj homoj kaj familioj. La pandemio aperigis kontraŭdirojn kaj malegalecojn. Ĝi minacis la laboran sekurecon de multaj kaj pligravigis la solecon pli kaj pli disvastiĝantan en niaj socioj.

Il COVID-19 ci ha fatto piombare nel cuore della notte, sconvolgendo la nostra vita ordinaria, i nostri piani e le nostre abitudini. Il COVID-19 ha provocato anche un malessere generale che si è concentrato nel cuore di tante persone e famiglie. La pandemia ha fatto emergere contraddizioni e disuguaglianze. Ha minacciato la sicurezza lavorativa di tanti e aggravato la solitudine sempre più diffusa nelle nostre società.

La plej granda leciono, kiun KOVIM-19 lasis al ni kiel heredaĵon estas la konscio, ke ĉiuj bezonas unu la alian, ke nia plej granda trezoro estas la homa frateco kaj ke neniu povas saviĝi per si sola.

Ni ankaŭ lernis, ke nia konfido je la progreso, je la teknologio kaj je la efikoj de la tutmondiĝo estis troa.

Ni ankaŭ faris pozitivajn malkovrojn: la reveno al humileco; la reduktiĝo de iuj konsumismaj kutimoj; la solidareco, kiu kuraĝigas nin eliri el nia egoismo por malfermiĝi al la suferado de la aliaj kaj al iliaj bezonoj; la engaĝiĝo, kelkfoje vere heroa, de multaj homoj, kiuj laboris por ĉiuj. Ni iĝis konsciaj pri la fakto, ke per frateco kaj solidareco ni povas konstrui la pacon, certigi justecon, superi la plej dolorajn eventojn.

Poste, ni spektis la aperon de alia plago: plia milito gvidata de kulpaj homaj elektoj. La milito en Ukrainio falĉas senkulpajn viktimojn kaj disvastigas necertecon. Tiu ĉi ne estas la periodo post KOVIM, kiun ni esperis vidi aŭ atendis. Dum por KOVIM-19 oni eltrovis vakcinon, por la milito ankoraŭ oni ne eltrovis solvojn taŭgajn, ĉar ĝi venas el la intimeco de la homa koro, koruptita de la peko.

Ni devas permesi al la escepta periodo, kiun ni travivis, ŝanĝi nian koron. Ni ne povas celi nur la protektadon de ni mem, sed estas tempo, ke ni ĉiuj engaĝiĝu por la resaniĝo de nia socio kaj de nia planedo, kreante la fundamentojn por mondo pli justa kaj pacohava, intence serĉanta iun bonon, kiu vere estu komuna.

Kaj sekve, ni estas vokataj alfronti la defiojn de nia mondo kun respondeco kaj kompato: publika sano por ĉiuj; paco por ĉesigi konfliktadojn kaj militojn, kiuj daŭre estigas viktimojn kaj malriĉecon, klimatajn ŝanĝojn, malegalecojn; nutrado kaj deca laboro por ĉiuj. Nur ĉi-maniere ni povos konstrui mondon novan kaj kontribui al konstruado de la Regno de Dio, kiu estas Regno de amo, justeco kaj paco.

La più grande lezione che il COVID-19 ci lascia in eredità è la consapevolezza che abbiamo tutti bisogno gli uni degli altri, che il nostro tesoro più grande è la fratellanza umana e che nessuno può salvarsi da solo.

Abbiamo anche imparato che la nostra fiducia nel progresso, nella tecnologia e negli effetti della globalizzazione è stata eccessiva.

Abbiamo anche fatto scoperte positive: il ritorno all'umiltà, il ridimensionamento di certe abitudini consumistiche, la solidarietà che ci incoraggia a uscire dal nostro egoismo per aprirci alla sofferenza degli altri e ai loro bisogni, l'impegno, in certi casi veramente eroico, di tante persone che si sono spese per tutti. Siamo diventati consapevoli che nella fraternità e nella solidarietà, possiamo costruire la pace, garantire la giustizia, superare gli eventi più dolorosi.

Poi, abbiamo assistito all'insorgere di un altro flagello: un'ulteriore guerra guidata da scelte umane colpevoli. La guerra in Ucraina miete vittime innocenti e diffonde incertezza. Non è questa l'era post-COVID che speravamo o ci aspettavamo. Mentre per il COVID-19 si è trovato un vaccino, per la guerra ancora non si sono trovate soluzioni adeguate perché proviene dall'interno del cuore umano, corrotto dal peccato.

Dobbiamo lasciarci cambiare il cuore dall'emergenza che abbiamo vissuto. Non possiamo perseguire solo la protezione di noi stessi, ma è l'ora di impegnarci tutti per la guarigione della nostra società e del nostro pianeta, creando le basi per un mondo più giusto e pacifico, seriamente impegnato alla ricerca di un bene che sia davvero comune.

E allora, siamo chiamati a far fronte alle sfide del nostro mondo con responsabilità e compassione: salute pubblica per tutti, pace per mettere fine ai conflitti e alle guerre che continuano a generare vittime e povertà, cambiamento climatico, disuguaglianze, cibo e un lavoro dignitoso per tutti. Solo così potremo costruire un mondo nuovo e contribuire a edificare il Regno di Dio, che è Regno di amore, di giustizia e di pace.



Kiam la monaĥejoj savis la hebreojn

Quando i conventi
salvarono gli ebrei

esperantigis F.Fagnani

La germanaj trupoj de la Gestapo, kun la kunlaboro de la funkciuloj de la faŝisma reĝimo de la Itala Socia Respubliko, inter la horoj 05:30 kaj 14:00 de sabato la 16-an de Oktobro 1943 efektivigis en Romo la rastadon de 1259 homoj, el kiuj 689 virinoj, 363 viroj kaj 207 infanoj, preskaŭ ĉiuj apartenantaj al la roma juda komunumo.

Ili ĉiuj estis deportitaj al koncentrejoj kaj nur 16 el ili transvivis. Aliaj, dum la horoj antaŭ la atako, jam fuĝis, serĉe de sekura rifuĝejo por eviti la morton.

Multaj frapis je la pordoj de preĝejoj kaj monaĥejoj en la senespera klopodo trovi rifuĝon tie. Pli ol kune 220 monaĥejoj, preĝejoj kaj domoj apartenantaj al diversaj religiaj ordenoj, gastigis ĉirkaŭ 4500 hebreojn el Romo, preskaŭ la duonon de la tuta juda Komunumo de la ĉefurbo, tiam konsistanta el 10 mil – 12 mil homoj.

La persona sekretario de Pio la 12-a, Robert Leiber, en la jaro 1961 malkaŝis, ke la papo informis, ke la religiaj domoj “povis kaj devis” doni rifuĝon al la hebreoj.

Memorindas, ke inter Septembro kaj Oktobro 1943, la Ŝtata Sekretariejo kaj la Vikariejo de

Truppe tedesche della Gestapo con la collaborazione di funzionari del regime fascista della Repubblica Sociale Italiana tra le ore 05:30 e le ore 14:00 di sabato 16 ottobre 1943 effettuarono a Roma il rastrellamento di 1259 persone, di cui 689 donne, 363 uomini e 207 tra bambini e bambine, quasi tutti appartenenti alla comunità ebraica romana.

Furono tutti deportati nei campi di concentramento e soltanto 16 di loro sopravvissero. Altri, nelle ore notturne precedenti all'incursione, erano fuggiti in cerca di un rifugio sicuro per sfuggire alla morte.

Molti bussarono alla porta di chiese e monasteri nel disperato tentativo di trovarvi riparo. Oltre 220 fra conventi, chiese e case appartenenti a vari ordini religiosi ospitarono circa 4500 ebrei di Roma, quasi metà dell'intera Comunità Ebraica della Capitale, all'epoca costituita da 10mila - 12mila persone.

Il segretario particolare di Pio XII, Robert Leiber, nel 1961 rivelerà che il Papa aveva fatto sapere che le case religiose “potevano e dovevano” dare rifugio agli ebrei.

Va ricordato che, tra settembre e ottobre 1943, la Segreteria di Stato e il Vicariato di

Romo disdonis al la diversaj religiaj institutoj afiŝojn deklarantaj la eksterteritoriecon de la lokoj, por eviti traserĉadojn kaj enrompojn.

Pastroj kaj gereligiuloj “Justuloj inter la popoloj”

Inter la italoj proklamitaj “Justuloj inter la popoloj” fare de Yad Vashem, la israela memorloko pri la Holokaŭsto, estas 30 diocezaĵaj pastroj, 12 religiuloj, 15 religiulinaj kaj 4 episkopoj.

El ili ni volas rememori pastron Pietro Pappagallo (1888 – Romo, 24-an de Marto 1944), viktimo de la masakro en la Ardeaj Kavernoj kaj postmorte honorigata per ora medalo pro civilaj motivoj.

Ekde la armistico de la 8-a de Septembro 1943, pastro Pietro malfermis sian domon al la kaŝfuĝantaj soldatoj, al la politikaj persekutitoj kaj al kelkaj hebreoj. Li proponis gastigadon kaj falsajn dokumentojn, ankaŭ kunlabore kun la monaĥinoj de la monaĥinejo de la filinoj de Nia Sinjorino de Namur.

Li estis denunciata de gastata armeano, nome Crescentini, kaj la 29-an de Januaro 1944 li estis kondukita al strato Tasso, kie havis sian sidejon la nazia sekureca polico. Oni enfermis lin en la ĉelo numero 13 kaj suferis plurfoje torturojn kaj batojn. Dum tiuj semajnoj pastro Pietro ne konigis la nomojn de siaj kontaktoj en la rezistomovado. Pro la atenco en strato Rasella de la 23-a de Marto 1944, pastro Pappagallo estis aldonita al la listo de la viktimoj de la germana reprezalio.

Li estis kondukita al la Ardeaj Kavernoj, ununura pastro inter la 335 kaptitoj mortigitaj la 24-an de Marto. Laŭ iu atesto, li faris ĉion eblan por beni la viktimojn de tiu nazia masakro.

Dum la Jubileo de la jaro 2000 Johano Paŭlo la 2-a aldonis lin al la martiroj de la Eklezio de la 20-a jarcento.

Roma fecero distribui ai vari istituti religiosi cartelli attestanti la extraterritorialità del luogo per evitare perquisizioni e irruzioni.

Sacerdoti, religiose e religiosi “Giusti tra le Nazioni”

Tra gli italiani proclamati “Giusti tra le Nazioni” dallo Yad Vashem, il memoriale israeliano dell'Olocausto, ci sono 30 sacerdoti diocesani, 12 religiosi, 15 religiose e 4 vescovi.

Tra questi vogliamo ricordare don Pietro Pappagallo (1888 – Roma, 24 marzo 1944), vittima dell'eccidio delle Fosse Ardeatine e medaglia d'oro al merito civile alla memoria.

A partire dall'armistizio dell'8 settembre 1943, don Pietro aprì la sua casa ai militari sbandati, perseguitati politici e ad alcuni ebrei. Don Pappagallo offriva ospitalità e documenti falsi, anche in collaborazione con le suore del convento delle figlie di Nostra Signora di Namur.

Fu denunciato da un militare ospitato di nome Crescentini e il 29 gennaio 1944 fu condotto a via Tasso, dove aveva sede la polizia nazista di sicurezza. Fu rinchiuso nella cella numero 13, subendo ripetutamente torture e percosse. In quelle settimane don Pietro mantenne il silenzio sui nomi dei suoi contatti nella resistenza. In seguito all'attentato compiuto a via Rasella il 23 marzo 1944, don Pappagallo venne incluso nell'elenco delle vittime della rappresaglia tedesca.

Fu condotto alle Fosse Ardeatine, unico prete tra i 335 prigionieri uccisi il 24 marzo. Secondo una testimonianza, avrebbe fatto ogni sforzo per benedire le vittime di quell'eccidio nazista.

Durante il Giubileo del 2000 Giovanni Paolo II lo ha incluso tra i martiri della Chiesa del XX secolo.

Memore al Profesoro Mario Sola

Ricordando il
Professor Mario Sola

la prezidantino: Tiziana Fossati



Pasis dudek kvin jaroj de la unua de Januaro 1998 kiam la tiama UECI-prezidanto Profesoro Mario Sola abrupte forpasis. Granda estis la konsterno de la membroj, precipe de tiuj, kiuj telefone parolis kun li antaŭ kelkaj tagoj.

Mario Sola estis UECI-prezidanto de la jaro 1993 ĝis la jaro 1998. Li fondis la esperantan sektion en Vercelli kaj estis UEA-delegito.

En la eklezia komunumo li estis membro de la “Katolika Agado”, de la Paŝtista Konsilio kaj kunfratulo de “Societo Sankta Vincenzo de Paul”.

Li ankaŭ engaĝiĝis en la Movado kaj Centro de helpo al la vivo, akcelante respekton kaj dignon por ĉiu vivo. Li ankaŭ estis komunuma konsilisto.

Tiuj, kiuj konis lin rememoras lin kiel viron el granda kulturo kaj rimarkindaj organizaj kapabloj. Li estis konvinkita esperantisto, akcelanto de Esperanto ne nur en sia urbo sed ankaŭ je nacia kaj internacia nivelo.

Tuj kiam li estis elektita UECI-prezidanto, li sin fordonis por presigi la revuon Katolika Sento, kies eldonado ĉesis kelkajn jarojn antaŭe.

Liaj verkoj en Katolika Sento atestas lian

Sono trascorsi 25 anni dal 1° gennaio 1998 quando l'allora presidente UECI prof. Mario Sola improvvisamente ci lasciò. Grande fu lo sgomento dei soci, soprattutto di quelli che avevano telefonicamente parlato con lui qualche giorno prima.

Mario Sola fu presidente UECI dal 1993 al 1998. Fondò la locale sezione esperantista e fu delegato UEA.

Nella comunità ecclesiale egli fu membro dell'Azione Cattolica, del Consiglio Pastorale e confratello della “Società San Vincenzo de Paoli”.

Si impegnò anche nel Movimento e nel Centro di aiuto alla vita promuovendo il rispetto e la dignità di ogni vita. Fu anche consigliere comunale.

Coloro che lo hanno conosciuto lo ricordano come un uomo di grande cultura e di notevoli capacità organizzative. Fu un convinto esperantista, un promotore dell'Esperanto non solo nella sua città ma anche a livello nazionale e internazionale.

Appena eletto come presidente UECI, si prodigò per far stampare la rivista Katolika Sento che aveva sospeso le pubblicazioni per alcuni anni.

I suoi scritti su Katolika Sento testimoniano

konvinkon, ke Esperanto estas unu el la rimedoj je dispono de la kristanoj por komuniki al la aliaj la Veron kaj atesti iliajn valorojn en la esperanta mondo. Li instigis la anojn konfesi la Kredon kiel mision, konscii pri sia tasko de esperantistoj kaj fieri pri ĝi.

Li skribis: «Ni estu dankemaj al Dio pro la donaco de la Kredo, kiun ni ricevis kaj ni esprimu nian dankemon donante ateston ĉirkaŭ ni».

Profesoro Mario Sola estas unu el la eksterordinaraj personoj, kiuj faris historion de nia asocio.

la sua convinzione che l'esperanto è una delle risorse a disposizione dei cristiani per comunicare agli altri la Verità e testimoniare i propri valori nel mondo esperantista. Spronò i soci a professare la loro Fede come missione, a prendere coscienza del loro compito di esperantisti e di esserne fieri.

Egli scrisse: «Siamo riconoscenti a Dio del dono di Fede che abbiamo ricevuto ed esprimiamo la nostra gratitudine rendendo testimonianza intorno a noi».

Il Professor Mario Sola è una delle straordinarie persone che hanno fatto la storia della nostra associazione.

MEDITO PRI LA KRUCO

MEDITAZIONE SULLA CROCE

aŭtoro Don Tonino Bello

esperantigis F. Fagnani

«Tamen... Jesuo ne estas viktimo de la forto de la sorto; li supreniris la krucon ĉar li volis tion. Lia akceptado ne estas pasiva rezignacio, sed akceptado de la kruco, akceptado de la volo de la Patro. Bedaŭrinde plurfoje nia kristana vivo ne renkontas la vojon de la Kalvario. Ĝi ne grimpas laŭ la vojturniĝoj de la Golgota. Ni alkroĉis ĝin kun respekto al la muroj de nia hejmo, sed ni ne fiksis ĝin en nian koron. Ĝi pendas de nia kolo, sed ne super niaj elektoj. Ni kliniĝas antaŭ ĝi en la preĝejo, sed ni restadas ĉe la antipodoj de ĝia logiko. Ni izolis la krucon: ĝi estas nobla arbo kreskanta sur ĉirkaŭbaritaj terbutoloj, en la historia centro de niaj religiaj memoroj, ene de la arkeologia loko de niaj sentoj, sed tro malproksime de la rapidvojoj laŭ kiuj ni vojaĝas ĉiutage.

Ni bezonas repaciĝi kun la kruco kaj retrovi, sur la vojmapo de nia paganeca ekzistado, la ĝustan straton, kiu kondukas al la piedoj de la kondamnito»!

«Eppure... Gesù non è vittima della forza del destino; è salito sulla croce perché l'ha voluto. La sua accettazione non è rassegnazione passiva, ma è accoglienza della croce, è accettazione della volontà del Padre. La nostra vita cristiana purtroppo tante volte non incrocia il cammino del Calvario. Non s'inerpica sui tornanti del Golgota. L'abbiamo attaccata con riverenza alle pareti di casa nostra, ma non ce la siamo piantata nel cuore. Pende dal nostro collo, ma non pende sulle nostre scelte. Le rivolgiamo inchini in chiesa, ma ci manteniamo agli antipodi della sua logica. La croce l'abbiamo isolata: è un albero nobile che cresce su zolle recintate, nel centro storico delle nostre memorie religiose, all'interno della zona archeologica dei nostri sentimenti, ma troppo lontano dalle strade a scorrimento veloce che battiamo ogni giorno.

Abbiamo bisogno di riconciliarci con la croce e di ritrovare, sulla carta stradale della nostra esistenza paganeggiante, lo svincolo giusto che porta ai piedi del condannato»!



La gaudenciana vando en Varallo Sesia

La parete gaudenziana
a Varallo Sesia

aŭtorino Tiziana Fossati
esperantigis: Francesco Fagnani

En la eklezia arkitekturo la **vando** estas tiu muro, kiu dividas la preĝejon malfermitan al la publiko el tiu rezervita nur al religiuloj.

La **vandoj freskitaj** kun scenoj de la vivo kaj de la pasio de Kristo reprezentas fenomenon kulturen kaj artan tipan de la franciskanaĵ devoteco kaj spiritualeco, inter la 15-a kaj la unuaj jardekoj de la 16-a jarcento en Piemonte, Lombardio kaj en Kantono Tiĉino.

In architettura ecclesiastica il **tramezzo** è la parete che divide la chiesa aperta al pubblico da quella riservata ai soli religiosi.

I **tramezzi affrescati** con le scene della vita e della passione di Cristo rappresentano un fenomeno culturale e artistico tipico della devozione e della spiritualità francescana tra il XV ed i primi decenni del XVI secolo in Piemonte, Lombardia e nel Canton Ticino.

Tiuj ĉi pentritaj vandoj estas komunaj al ĉiuj preĝejoj fonditaj de la franciskanoj, aneksitaj al apudaj monaĥejoj.

La monaĥejoj preĝejoj enhavantaj ĉi tiujn vandoj prezentas komunajn arkitekturajn karakterizojn.

Ekstere ili estas tre simplaj, kun duklina tegmento. La vandon subtenas tri arkaĵoj kaj, trans ĝi, la preĝejo rezervita al religiuloj konsistas el du etaj kvadrataj ĉambroj, kovritaj per krucvolboj.

La plejparto de la vandoj estis detruita dum la sekvaj jarcentoj. Unu el la plej famaj estas la gaudenciana vando de la preĝejo de Sankta Maria de la Gracoj en Varallo Sesia, en provinco Verĉelo. La preĝejo staras flanke de monaĥejo kaj ĉe la piedo de la Sankta Monto, t.e. la grandioza komplekso el 44 kapeloj kun miloj da figuroj en la freskoj kaj centoj da statuoj reprezentantaj la ĉefajn scenojn de la Biblio.

La rigardo de la eniranto estas tuj tuŝita kaj kaptita de la sceneja efekto kaj de la koloroj de la pentraĵoj sur la vando, kiu dividas la konstruaĵon en du partojn.

La vando enhavas unu el la serio da freskoj pli gravaj de la fama renesanca pentristo de tiu ĉi teritorio: **Gaudenzio Ferrari**.

La freskoj rakontas en 20 scenoj la vivon kaj la pasion de Kristo, el la Anonco ĝis la Resurekto, okupante entute surfacon el 10,4 oble 8 metroj. La scenojn regas la granda kaj tragika sceno de la Krucumado, kiu kovras pli ol la duoblon de la spaco uzata por la aliaj freskoj.

La bildoj estas aranĝitaj kiel en ilustrita libro, ĉar la celo de la gaudenciana vando estis evangelizi la fidelulojn. Por la franciskanoj, unuaj gardantoj de la preĝejo de Sankta Maria de la Gracoj kaj de la Sankta Monto de Varallo, la pentraĵoj estis maniero por klarigi la Evangeliojn.

Queste pareti dipinte sono comuni a tutte le chiese fondate dai Frati Minori, annesse ad attigui conventi.

Le chiese conventuali che ospitano queste pareti hanno caratteristiche architettoniche comuni.

All'esterno sono assai semplici, con tetto a capanna. Il tramezzo è retto da tre arcate e, al di là di esso, la chiesa riservata ai religiosi è composta da due vani quadrati di modeste dimensioni, coperti da volte a crociera.

La maggior parte dei tramezzi andò distrutta nei secoli successivi. Uno dei più famosi è la parete gaudenziana della chiesa di Santa Maria delle Grazie a Varallo Sesia in provincia di Vercelli. La chiesa è affiancata ad un convento e posta ai piedi del Sacro Monte, il grandioso complesso di 44 cappelle con migliaia di figure affrescate e centinaia di statue che raffigurano le principali scene della Bibbia.

Lo sguardo di chi entra nella chiesa è immediatamente colpito e catturato dall'effetto scenico e dai colori delle pitture presenti sulla parete che divide in due sezioni l'edificio.

La parete ospita uno dei cicli di affreschi più importanti del celebre pittore rinascimentale di questo territorio: **Gaudenzio Ferrari**.

Gli affreschi raccontano in 20 episodi la vita e la passione di Cristo, dall'Annunciazione alla Resurrezione, occupando una superficie totale di 10,4 metri x 8. Le scene sono dominate dalla grande e drammatica scena della Crocifissione, che occupa invece più del doppio dello spazio delle altre.

Le immagini sono disposte quasi come in un libro illustrato perché lo scopo della parete gaudenziana era evangelizzare i fedeli. Per i francescani, primi custodi della chiesa di Santa Maria delle Grazie e del Sacro Monte di Varallo, i dipinti erano un modo per spiegare i Vangeli.



Monda tago de la gepatra lingvo

Giornata mondiale della lingua paterna

Mundi, la nacia muzeo de la itala lingvo

Mundi, il museo nazionale della lingua italiana



Mundi estas la unua muzeo tute dediĉita al la itala lingvo.

Ĝi naskiĝis dank' al la sindevigo de la Ministerio pri Kulturo, de la Komunumo de Florenco, de la ĉefaj institucioj pri studado kaj antaŭenigo de nia lingvo (Akademio de la Crusca, Akademio dei Lincei, Societo Dante Alighieri, Asocio pri la Historio de la itala Lingvo, Instituto de la Itala Enciklopedio Treccani) kaj de la laborgrupo kunordigita de lingvistoj kaj filologoj.

En 2022 ĝi estis inaŭgurita en Florenco en la iama monaĥejo de la Sanktega Koncipiĝo, interne de la arkitektura domaro de Sankta Maria Novella.

La nomo Mundi elvokas du fundamentajn karakterizojn de nia lingvo: la rilaton kun la latina lingvo (mundi estas la genitivo de mundus, t.e. mondo) kaj la ideon de la itala kiel monda lingvo, riĉa je influoj kaj rilatoj, kiuj, tra la jarcentoj, ĝin ligis al aliaj lingvoj kaj kulturoj.

La vizito al la muzeo permesos rekonstrui "la vivon" de la itala, ekde loka popola lingvo ĝis nacia lingvo, ĝis ĝia iompostioma sukceso kiel granda lingvo de la eŭropa kulturo.

La vizitanto povos trarigardi la kunligojn de nia lingvo kun fakoj kiel arto, literaturo, muziko, scienco.

La muzeo estas moderna, dinamika kaj teknologia spaco.

Estonte ĝi havos ekspoziciojn de manuskriptoj, libroj, pentraĵoj kaj objektoj ligitaj al la historio de la itala sed oni ankaŭ disponigos multajn ciferecajn aparatojn, plasmoekranojn kaj diĝitajn tekojn, kiuj permesos al vizitantoj ekzameni unikajn dokumentojn, kiuj estas konservataj en diversaj italaj kaj alilandaj bibliotekoj.

Il Mundi è il primo museo interamente dedicato alla lingua italiana.

Nasce grazie all'impegno del Ministero della cultura, del Comune di Firenze, delle massime istituzioni che si occupano dello studio e della promozione della nostra lingua (Accademia della Crusca, Accademia dei Lincei, Società Dante Alighieri, Associazione per la Storia della Lingua Italiana, Istituto della Enciclopedia Italiana Treccani) e del gruppo di lavoro coordinato da linguisti e filologi.

È stato inaugurato a Firenze nell'ex monastero della Santissima Concezione all'interno del complesso di Santa Maria Novella nel 2022.

Il nome Mundi evoca due aspetti fondamentali della nostra lingua: il rapporto con la lingua latina (mundi è il genitivo di mundus cioè "mondo") e l'idea dell'italiano come lingua del mondo, ricca di influenze e di relazioni che nel corso dei secoli l'hanno legata ad altre lingue e culture.

La visita al museo consentirà di ricostruire "la vita" dell'italiano, da volgare locale a lingua nazionale fino al suo progressivo affermarsi come grande lingua di cultura europea.

Il visitatore potrà esplorare le connessioni della nostra lingua con discipline quali l'arte, la letteratura, la musica, la scienza.

Il museo è uno spazio moderno, dinamico e tecnologico.

Esporrà manoscritti, libri, quadri e oggetti legati alla storia dell'italiano ma utilizzerà anche molti dispositivi digitali, schermi al plasma e teche digitali che permetteranno ai visitatori di visionare documenti unici conservati in diverse biblioteche e archivi italiani e stranieri.


96 jaroj da historio. Tiu mia

Nia membrino Norma Cescotti Covelli estas la aŭtorino de la libro titolita "96 jaroj da historio. Tiu mia". Dank' al la helpo de ĵurnalistino Maurizio Panizza la libro rakontas la personajn travivaĵojn de Norma sed ankaŭ gravajn historiajn okazaĵojn ek de la epoko de faŝismo ĝis niaj tagoj. Norma rakontas ankaŭ sian engaĝiĝon por la instruado de Esperanto, pro kiu ŝi atingis renomon kiam la televida ĵurnalo RAI 1 intervjuis ŝin. Dum la pandemio, fakte, ŝi daŭrigis instrui Esperanton pere de Skajpo.



Preĝosemajno por la unueco de la kristanoj, 2023

De la la 18-a de Januaro ĝis la 25-a okazis la preĝosemajno por la unueco de la kristanoj 2023. Ankaŭ la kristanaj esperantistoj ĉiutage, vespere, pere de platformo Zoom, kolektiĝis por kune preĝi intense. Partoprenis geesperantistoj de la tuta mondo inter kiuj pluraj UECI-anoj. Oni legis la libreton kompilitan sub la gvido de la IKUE-prezidantino Marija Beloŝević kunlabore kun kelkaj geesperantistoj kaj oni trapreĝis la rozarion. Mireille Grosjean prelegis pri "Kristanismo en Japanio".



87-a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj

kun Seminario Erasmus+

(Italujo, Francujo, Polujo kaj UEA) 3-10 Junio 2023.

Loko: San Benedetto del Tronto, ridanta turisma urbeto ĉe maro Adriatiko. Gastigado: tristela hotelo, 350 eŭroj en dulita ĉambro, inkluzive

d e ĉio: sep noktoj, pensiono kompleta. strandaj servoj, esperantista medio. Kongresaj eventoj: prelegoj (Fabrizio Pennacchietti, Francesco Maurelli, Aldo Grassini, Violetta De Filippo, Nedeljka Loĵajiĉ), koncertoj, ekskursoj. Por informoj kaj detaloj: Violetta De Filippo, violadefilippo@gmail.com; tel. +39.338.9486830

KONGRESO 2023

Quest'anno Vicenza ospiterà il nostro annuale incontro dalla sera del 29 giugno alla domenica mattina del 2 luglio.

L'assemblea sarà convocata sabato mattina 1° luglio alle ore 9.30

Saremo ospitati presso la Casa Sacro Cuore delle Suore Dorotee Figlie dei Sacri Cuori di Vivcenza in corso Padova 122. Avremo la possibilità della Santa Messa e del Santo Rosario in lingua esperanto.

È possibile partecipare anche solo qualche giorno o senza alloggio. Consci delle difficoltà di partecipazione da parte di soci che vivono lontano, il Comitato Centrale si permette di sollecitare la partecipazione dei soci che abitano nelle zone e regioni circostanti al fine di instaurare un rapporto di conoscenza e collaborazione.

La quota di iscrizione è di € 20 per i soci e € 10 per i familiari, non pagano ragazzi e bambini. A questa si aggiungerà il costo facoltativo di una card (€ 15) per la visita a 4 monumenti da pagare sul posto. L'iscrizione deve essere fatta entro il 15 di aprile.

Per il soggiorno la spesa sarà di € 176,5 in camera singola e € 166,5 in camera doppia a persona (comprensiva dell'imposta di soggiorno). Visiteremo il Santuario di Monte Be-

rico, il Teatro Olimpico, la Chiesa di Santa Corona, la Basilica Palladiana, la cappella di Santa Bertilla e, a scelta, altri 2 monumenti compresi nel prezzo della card. Informazioni più dettagliate per le visite e le conferenze saranno inviate per posta o mail.

Per informazioni si prega di scrivere all'indirizzo di posta elettronica: katolika.sento@ueci.it o di telefonare ai numeri 339.1830068 – 039.464942.

Vicenza fu proclamata nel 1994 dall'Unesco patrimonio dell'Umanità, per i numerosi contributi architettonici del Palladio. Oltre ai 23 siti palladiani, Vicenza è una città ricca di monumenti, palazzi e chiese che testimoniano i diversi momenti storico-artistici della sua storia.

Fiorento fu l'architettura religiosa nei secoli passati. Molto diffuso è pure il culto mariano.

Nel 1426 la Vergine Maria apparve per la prima volta a una donna chiedendo di costruire un luogo di culto proprio dove lei era apparsa promettendo di liberare la città dal flagello della peste. Sorse così il Santuario della Madonna di Monte Berico, uno dei maggiori centri di devozione mariana d'Italia situato sull'omonimo colle da cui domina la città.



KATOLIKA SENTO

Trimonata revuo de **Itala Katolika Esperantista Unuiĝo** fundita en 1920
Rivista trimestrale dell'**Unione Esperantista Cattolica Italiana** fondata nel 1920

KOTIZTABELO

SO	Associato ordinario solo UECI	con KS	€ 22,00
SG	Associato giovane solo UECI	con KS	€ 11,00
SF	Associato familiare solo UECI	senza KS	€ 11,00
SS	Associato sostenitore solo UECI	con KS	€ 44,00
SR	Associato religioso solo UECI	con KS	€ 0
AK	Offerta minima per KS		€ 10,00
SO + AM	Associato ordinario UECI+IKUE	con KS ed EK	€ 32,00
SG + AMJ	Associato giovane UECI+IKUE	con KS ed EK	€ 16,00
SF + MF	Associato familiare UECI+IKUE	senza KS ed EK	€ 23,50
SS + AM	Associato sostenitore UECI+IKUE	con KS ed EK	€ 52,00

La presente rivista viene inviata in modalità cartacea ai soci ordinari, giovani e sostenitori; non ai soci familiari. La rivista dell'IKUE, Espero Katolika, viene inviata tramite posta elettronica in formato PDF. Coloro che fossero interessati alla copia cartacea devono rivolgersi direttamente ad IKUE all'indirizzo internet: www.ikue.org

Per i versamenti su conto corrente postale:

n. 47127675 Unione Esperantista Cattolica Italiana U.E.C.I.

IBAN: IT66 R076 0101 6000 0004 7127 675 — BIC/SWIFT: BPPIITRRXXX

Nella causale specificare:

1) Categoria dell'associato; 2) anno di nascita per i giovani; 3) esatto indirizzo per il recapito del periodico; 4) destinazione di eventuali offerte.

REDAKCIO

La residenza del presidente è sede dell'Associazione e della Redazione: Via F. Filzi, 30/A, 20851 Lissone (MB); tel. +39 039464942 – e-mail: katolika.sento@ueci.it

Direttore: Mons. Gianni Ambrosio

Collaboratori: N. Covelli, M. De Martini, F. Fagnani, C. Sarandrea, T. Fossati, C. Franchitti, G. Gazzola, M.G. Valente, E. Bottinelli

Periodico trimestrale - Reg. Trib. di Vercelli 22.12.1997 n. 306

Sped. in abb. post. art. 2 comma 20/c L662/96 – filiale di Vercelli

Direttore resp.: Mons. Gianni Ambrosio

Dir. e amm.: Via F. Filzi 30^a Lissone – Stampato da: Centro Grafico Pirola

Pagina internet: <http://www.ueci.it>

Alcune immagini sono state reperite in internet e sono di proprietà dei legittimi proprietari.